

6/2020

Novembro
Decembro

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Zamenhofa Stafeto
- ★ Monda tago de Afableco
- ★ Kastelo en Baranów Sandomierski

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Kunlaboro

Teresa Nemere, Roman Dobrzyński
Andrzej Sochacki, Adam Wilkus

ABONOJ

La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 53 zlotoj

eksterlando - 20 eŭroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj

eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: peaa-v;

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>

kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek - sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendadas.

La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.

Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001
liberan monsumon priskribu
per vorto "Darowizna"



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Hanna Zaruski-Zamenhof, Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof
Margaret Zaleski-Zamenhof

Enhavo

| | |
|---|----|
| Redaktoraj vortoj | 2 |
| Estraro informas | |
| <i>Aleksander Zdechlik</i> , Laboroj ĉe PEA-statuto | 3 |
| Evento | |
| <i>Teresa Pomorska</i> , La 44-aj Esperantistaj Preĝtagoj – 2020 | 4 |
| <i>Przemysław Wierzbowski</i> , Zamenhof denove pentrita | 7 |
| Mojose | |
| <i>www.pej.pl</i> , Grava anonco, | 8 |
| <i>www.pej.pl</i> , Membriĝo en PEJ kaj TEJO | 8 |
| Raportoj, rakontoj | |
| <i>Adam Wilkus</i> , Ŝakludo | 9 |
| Pri kio ni aŭdas | |
| <i>UEA Komunikoj</i> , Kampanjo por Tutmonda Arbo-plantado (TAP) | 12 |
| Vizitindaj lokoj | |
| <i>Robert Kamiński</i> , Kastelo en Baranów Sandomierski | 13 |
| Homoj | |
| <i>Roman Dobrzyński</i> , Zamenhofa stafeto | 16 |
| Linguoscienca angulo | |
| <i>Plena Manlibro de E-a Gramatiko</i> , De rilate al A-vorto aŭ E-vorto | 19 |
| Literaturaĵoj | |
| <i>Irena Łowińska</i> , Estas tiu tago | 20 |
| Saĝulaj pensoj | |
| <i>Paŭlo Sergio Viana</i> , Brazilo, Monda Tago de Afableco | 22 |
| Leterkesto | |
| <i>Jerzy Dryja</i> , Esperanto sur la klostra retpaĝo | 23 |
| <i>Magdalena Tataro</i> , ILEI alvokas | 24 |
| https://masko.ikso.net/ , Esperanto-buŝmaskoj | 24 |
| Polyglot Gathering (Plurlingvula kunveno) | 26 |
| <i>Teresa Pomorska</i> , La 50-a jubileo de pastreco de Stanisław Płachta | 27 |
| E-Kalendaro | 27 |
| Diverse, facile, bonguste | |
| <i>Edeltraut Hennig</i> , Stufitaj kukumoj | 28 |
| Oni eldonis | |
| „Karta” pri Esperanto | 29 |
| „Dictionary, vortaro-słownik” | 29 |
| Forpasis | |
| <i>Tadeusz Barański</i> | 30 |
| El fotogalerio de Andrzej Sochacki | |
| <i>Andrzej Sochacki</i> , “PETRO” en Krościenko | 30 |
| Amuze | |
| <i>Adam Wilkus</i> , La krucenigmo pri insektoj | 32 |

Ne forgesu reaboni „Polan Esperantiston” por 2021

Estimataj legantoj!

Alproksimiĝas fino de la jaro 2020 - la jaro de neatenditaj eventoj kaj problemoj. Pandemio de kovido-19 havas multajn viktimojn. Suferas homoj, multaj infektiĝis kaj mortis, komplikiĝas ekonomio, turismo, fermiĝas hoteloj kaj restoracioj. Malfacilaĵojn havas ankaŭ Esperanto-movado. La kalendaro de tradiciaj Esperanto-renkontiĝoj malpleniĝas. Tamen, esperantistoj en kelkaj lokoj adaptiĝis kaj organizas novforman agadon. Okazis la UK en Kanado, Mondafest' kaj KAEST. En Pollando oni sukcesis organizi virtuale la 93-an SAT-kongreson, 21-ajn Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn, la 8-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj kaj 5-an Interlingvistikan Seminarion en Poznań.

Dum la tempo de iom malpliforta pandemio, inter aŭgusto kaj oktobro polaj gesamideanoj sukcesis organizi kelkajn tradiciajn kunvenojn - la 53-a Esperantista Internacia Feriado en Łądek Zdrój, 32-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, 44-aj Esperantaj Preĝtagoj en Częstochowa kaj 8-a Esperanto sur Strando en Sopot. La 26-an de septembro, malgraŭ ĉiuj obstakloj, PEA organizis devigan Ĝeneralan Kunvenon en Varsovio. Nekontentiga nombro de partoprenatoj permesis gardi devigan personan distancon en la malgranda ĉambro de PEA-sidejo kaj neniu infektiĝis. Ni akceptis financajn dokumentojn. Feliĉe, dum la kunveno, ne okazis elektoj de Ĉefa Estraro de PEA kaj Revizia Komisiono, kiu ĉiam postulas multe da tempo. Dum la kunveno ni akceptis novan regulon uzi modernan teknikon kaj organizi PEA-kunvenojn, kiu ebligos retan partoprenon de estrananoj kaj PEA-membroj. Novembre estis anoncita tiel nomata „ruĝa zono” por la tuta lando kaj ni devis denove reveni al hejmoj kaj al la virtuala agado. Multaj aliaj organizaĵoj alfrontas similajn problemojn.

Ĝis nun neniu kuraĝas prognozi, ĉu, kiam, kaj sub kiuj kondiĉoj oni rajtos remalfermi kulturcentrojn, restoraciojn, teatrojn, kinejojn ktp. Fine, ĉio dependos de tio, kiel rapide la nombro de kovim-19-kazoj malaltiĝos - de pluraj miloj dum tago ĝis maksimume pluraj centoj.

Ni konstata ke malgraŭ tio, ke oni nuligis verŝajne duonon da tradiciaj eventoj kaj renkontiĝoj nia movado ne tute malfortiĝas. Samtempe ĝojiga estas la fakto, ke la nombro de virtualaj kunvenoj kreskas kaj samideanoj malrapide alkutimiĝas al tiu nova formo de komunikado.

Malgraŭ ĉio, ni devas kun espero travivi tiun ĉi malfacilan periodon, akcepti novajn formojn de agado ankaŭ sur aliaj kampoj de nia vivo kaj kredi, ke ĉio bone trapasos (kiel mia infektiĝo de kovim-19 fine de novembro).

En la nomo de PEA-estraro, mi bondeziras al ĉiuj polaj samideanoj ĝojigajn kristnaskotagojn kaj feliĉan Novan Jaron 2021.

Robert Kamiński

Estraro de PEA

Laboroj ĉe PEA-statuto

Estimataj Gekolegoj! Dum la lasta Ĝenerala Kunveno de PEA, kiu okazis en Varsovio la 26-an de septembro 2020, oni decidis nomumi min kunordiganto de la laboro por plibonigo de la statuto de nia organizaĵo.

Dum mia laboro en la Ĉefa Estraro, ni rimarkis multajn ŝanĝindajn notojn en la statuto de PEA, sed, pro diversaj kialoj, ni ne povis fari ĉi tiujn ŝanĝojn. Tiel la tasko modifi la statuton „trairis” al nova Ĝenerala Estraro de La Ĉefa Estraro de PEA ne estas multnombra kaj tial mi volas helpi miajn gekolegojn.

Por ŝanĝi la nunan statuton, necesas sufiĉe longa periodo por diskuto. Mi antaŭvidas, ke tia diskuto daŭros ĝis la sekva Ĝenerala Kunveno de PEA. Estus bona multnombra partopreno de niaj membroj en la laboroj. Kompreneble, ankaŭ la voĉo nemembroj de PEA estos bonvena. La prilaborita projekto estu la rezulto de nia kolektiva saĝo. Ĉi tiu letero estos sendita al individuaj PEA-membroj kaj al PEA-filioj. Ordinaraĵaj membroj ricevos informojn en propraj filioj.

Nun kelkaj informoj pri organizaj detaloj. La tuta diskuto okazos ĉefe en nia retejo: www.esperanto.pl kaj, konsiderante la eldonan ciklon, en la suplemento al *Pola Esperantisto*. Ĉiu, kiu proponos ŝanĝon aŭ partoprenos en la diskuto, povas esti anonima. Antaŭ la diskuto bonvolu legi:

1) Statuto de Pola Esperantista Asocio - akceptita la 29-an de junio 2013. La statuto estas atingebla ĉe: www.esperanto.pl. Simple iru al la supra langeto "PEA" kaj trovu la bluan ligilon "Statuto".

2) La ŝtata Leĝo pri Asocioj. La nuna akto haveblas ĉe la suba ligilo: <http://isap.sejm.gov.pl/isap.nsf/download.xsp/WDU19890200104/U/D19890104Lj.pdf>.

Tial mi rekomendas al vi regule rigardi la retejojn de Pola Esperantista Asocio. Tie, aldone al ĉi tiu letero, estos prezentita ekzemplo pri kiel proponi ŝanĝojn kaj kien sendi viajn sugestojn. Fine mi volas informi, ke la diskuto pri la statuto okazos en la pola.

Aleksander Zdechlik

Teresa Pomorska

La 44-aj Esperantistaj Preĝtagoj - 2020

Malgraŭ la malfacila tempo de la kronviroza pandemio, la pola sekcio de IKUE decidis ne rompi longjaran tradicion kaj organizi laŭvican pilgrimadon de esperantistoj al Częstochowa.

La vetero dum la oktobra semajnfino (10-11) favoris nin kaj ni povis senprobleme realigi interesan programon, preparitan de nia pastro Roman Gmyrek – ne nur religian, sed ankaŭ turisman.

Sabate matene ni vizitis Helan Monton, kiu, sen la kutima amaso da pilgrimantoj, aspektis iom strange kaj eĉ triste. Post la saluto al Reĝino de Pollando, ni promenis sur la vasta spaco de la sankteja ĉirkaŭaĵo.

Postagmeze, per luita buso, ni iris al Złoty Potok – belega turisma loko, en la vico de ĵurasaj kalkŝtonaj rokoj, inter Kraków kaj Częstochowa (Jura Krakowsko-Częstochowska).





Ni promenadis en la granda, belega, historia parko, kiu ĉirkaŭas la klasikisman palacon de la familio Raczyński. La palaco staras apud la pitoreska lageto *Irydion*, en kiu ĝi respegulas sian “vizaĝon”. Najbare de la palaco estas situata biendomo, kiu apartenis al la familio Krasiński, nuntempe troviĝas tie Regiona Muzeo, dediĉita al la fama pola verkisto Zygmunt Krasiński, kiu en la jaro 1857 restadis tie dum kelkaj monatoj, ĉe siaj gepatroj. Dum tiu restado okazis la granda familia tragedio, ĉar mortis tie la plej juna filino de la verkisto - Elżbieta. Ŝi estas entombigita en la loka paroĥeja preĝejo. Tiun sanktejon ni ankaŭ vizitis, por partopreni en la esperantlingva sankta meso. La sekva alloga surprizo dum la ekskurso estis bongustega “rostita” truto, kiun ni manĝis sidante ĉe bordo de la lageto “Amerykan”.

Reveninte “hejmen”, ni pasigis agrablan vesperan tempon en la amika rondo – kantante kaj preĝante.

La pilgrimado estis kronita de la dimanĉmatena sankta meso, celebrita en Esperanto de la pastro Roman Gmyrek, ĉepiede de la Helmonta Sinjorino. Estis ankaŭ ebleco partopreni en ĝi virtuale, ĉar pli frue estis anoncite, ke okazos la rekta elsendo. La elsendo estis konservita de Mikaelo

Balicki el Wrocław kaj plu akireblas sur lia fejsbuka paĝo aŭ sur la paĝo, kiu nomiĝas “la liturgio de la Vorto”. Oni povas ankaŭ uzi la ligilon:

<https://www.facebook.com/groups/kristanaro/permalink/3353965057990020>

★★★

Resumante ni konstatas: en la 44-aj Esperantistaj Preĝtagoj partoprenis dudekkelkaj personoj. Estis bona tempo por ĉiuj, ĉar estis denove ebleco renkontiĝi, babili, komune kanti kaj preĝi. Ni ankaŭ povis ekkoni silueton de la pioniro de Esperanto **Józef Waśniewski**, kiu naskiĝis en (vizitita de ni) Żłoty Potok, en la jaro 1858. Laŭ la Esperanta Vikipedio, li estis unu el la plej agemaj pioniroj de Esperanto “nia Apostolo en Polujo”, kiel diris Zamenhof (Lingvo Internacia n-ro 3/1897). Liaj verkoj troviĝas en *La Esperantisto*, *Lingvo Internacia* kaj *Fundamenta Krestomatio*. En 1896, lia originala novelo „En la brikejo” estis premiita dum la unua konkurso de Esperanto-literaturo. Li, kiel la unua inter esperantistoj komencis tre gravajn vojaĝojn inter samideanoj. Oni povas diri, ke J. Waśniewski estis pioniro de Esperanto-turismo. Li korespondis kun esperantistoj el Norvegio kaj Svedio, rezulte de tio li komencis vojaĝi al Skandinavio. Li lernis la svedan, popularigis informojn pri Skandinavio en Pollando, kaj pri la pola literaturo – en Svedio. En la pola ilustrita semajngazeto *Wędrowiec (Vagabondo)* Waśniewski publikigis la serion de artikoloj *Wspomnienia z podróży na północ (Rememoroj el la vojaĝoj al la nordo)*.



Estas jam tradicio de la Preĝtagoj ligi en la programo spiritajn travivaĵojn kun turismo kaj movada edukado.

Venontjare – jubileaj, la 45-aj Preĝtagoj. Ni memoru pri tio en la oktobro 2021.

Laŭ retejo: <http://starepowazki.sowa.website.pl/Pochowani/spiszm.html>
Józef Waśniewski estas entombigita en Varsovio sur la tombejo Powązki sur parto 62. Certe indas trovi lian tombon kaj kontroli ĝian staton.

Robert Kamiński

Zamenhof denove pentrita

Ĉu vi jam vidis iun murpenetraĵon kunligitan kun Esperanto? Kie? Aperis la plia murpenetraĵo prezentanta inter aliaj bjalistokaj eminentulojn L.L. Zamenhof.

En la bazlernejo n-ro 20 je la nomo de Generalo Władysław Sikorski en Bjalistoko, la 20-an de oktobro 2020, la lernantoj partoprenantoj de la projekto "Bonega leciono pri valoroj laŭ la ekzemplo de la Bjalistoka panteono de naciaj herooj" pentris murpenetraĵon arte prizorgata de Rafał Roskowiński.

La lernantoj eternigis jenajn kvin, eminentaj por Bjalitoko, homojn – la pastro Stanisław Suchowolec, Irena Białówna, Zenek Borowski, Ludwik Zamenhof kaj Bronka Winnicka. En la venontaj semajnoj lernantoj de la lernejo ekscios pli pri ili de la fotekspozicio kaj scio-konkurso.

Ni ŝatus danki la partoprenantojn de la projekto pro ilia persisto kaj sindevontigo krei ĉi tiun verkon - al Rafał Roskowiński pro la arta prizorgo, kaj al la firmao „Primacol - farboj kaj ornamaĵefikoj” pro provizo per la plej bonaj farboj. La projekto estas parte financita de la ŝtata programo „#Niepodległa”. (# Sendependa)



Pola Esperanto-Junularo - www.pej.pl

Grava anonco

Pro la memkomprenebla kialo, ni devis nuligi la PEJ-semajnfinojn en Krakovo, planatan la 30.10.2020.

Ni ne volas riski sanon de la aliĝintoj - la urbo troviĝas nun en la ruĝa zono, tiaj cirkonstancoj ne ŝajnas tre favoraj.

Ni esperas, ke ni povos baldaŭ renkontiĝi kun vi!

Membriĝo en PEJ kaj TEJO

Ĉu vi ĵus finlernis Esperanton kaj volas ĝin ekuzi, sed vi ne certas kiel? Ĉu vi ŝatus renkonti novajn homojn kaj partopreni en diversaj projektoj, interŝanĝprogramoj kaj junularaj forumoj? Ĉu vi ŝatus helpi pri disvastigado de la lingvo en Pollando kaj en la mondo?

Ĉion tion, kaj multon alian, al vi ebligas membrado en Pola Esperanto-Junularo (PEJ)!

Kion konkrete ebligas al vi PEJ-membreco?

- **senpagan partoprenon** en festivalo pri Esperanta kulturo **ARKONES**
<http://arkones.org/> en Poznań

- **komunajn vojaĝojn** tra Pollando kaj eksterlanden

- porkomencantajn **interŝanĝojn** kun alilandaj junularaj E-asocioj

- partoprenon en **internaciaj projektoj**
Kaj kion ebligas membreco PEJ+Kontakto* (aliĝkategorio KTO)



Avantaĝoj de **PEJ** membreco

Oni ricevos verŝajne la plej bonan revuon en Esperantujo: simple legindan revuon Kontakto - <http://kontakto.tejo.org/>

Kaj se vi estas aktiva kaj ambiciplena, ne hezitu proponi vian helpon al teamoj de PEJ aŭ TEJO. Trovu vian lokon en Esperantujo kaj kreu kun ni la junularan Esperanto-movadon en Pollando kaj en la mondo!

Kiom tio kostas?

La kotizo **PEJ** - 10 zlotojn por 1 kalendara jaro. La kotizo **PEJ+Kontakto** - 55 zlotojn por 1 kalendara jaro.

Kiel membriĝi?

Tio simplas! Sufiĉas:

- plenigi **aliĝformularon** <http://pej.pl/pl/dolacz-do-nas/alighilo/kaj>
- pagi la kotizon al bankokonto: 10 2130 0004 2001 0558 6110 0003 (Volkswagen Bank), Polski Związek Esperantystów, ul. Gen. Wł. Andersa 37/59A, 00-159 Warszawa

La ĝiro estu kun la titolo: “[nomo] [familinomo] [tipo de membreco, do *PEJ* aŭ *PEJ+Kontakto*] [jaro por kiu estas pagata la kotizo]”, ekzemple “Ludwik Zamenhof PEJ+Kontakto 2019”.

Por pli rapida trakto de la pago, ni instigas vin sendi la pagopruvon al sekretario@pej.pl.

* Pri la aliĝkategorio KTO – legu <https://uea.org/alighoj/kotiztabelo/>

Raportoj, rakontoj

Adam Wilkus

Ŝakludo

Multaj homoj ŝatas tabulludojn, interalie tiel nomatan „la reĝan ludon”. La ŝakludo estas unu el la fenomenoj, kiuj proksimigas inter si la homojn kaj naciojn, same kiel la lingvo. Ĝi havas longan historion, sed ĝia komenco estas nebula. Oni scias, ke la ŝakludo fariĝis vaste populara jam en iama Persio. En la persa lingvo la esprimo „ŝako-mato” signifas „la reĝo estas morta”. En Pollando oni trovis la unuajn spurojn pri ŝakludado en la tempo de la reĝo Boleslavo la 3-a Kurbabuŝa. Jam en la antikva epoko la ludo havis grandan signifon en la internaciaj sociaj rilatoj. Tiu ludo estis la unua amuza okupo, dank' kiu ŝakludantoj kuraĝis migri al fremdajn landojn, por mezuri siajn fortojn, simile, kiel la nuntempaj sportistoj.

Esperantista ŝakmovado dum jardekoj estis aktiva kaj forta. Oni organizis ŝakkunvenojn kaj turnirojn. En la 1958 estis fondita Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŜLI). Bedaŭrinde, la nuna rapida ritmo de la vivo kaŭzis malaperon de la movado en la mondo kaj en Pollando. Eble la tempo de la kovim-19-pandemio donos ŝancon denove popularigi ĉi tiun antikvan ludon inter esperantistoj.



La ŝakludo postulas diversajn, konstante modifataj strategiojn kaj kontinuan decidadon. Dum la ludo, aktiviĝas samtempe, ofte kontraŭaj, intelektaj kapabloj, por prilabori la venkan strategion, kiu devas esti konstante kontrolata pro la respondoj de la kontraŭulo. Oni ne bezonas specialajn kapablojn ekde naskiĝo, por ludi ŝakon. Estas pruvite, ke ĉi tiuj kapabloj estas instrueblaj kaj ĉiuj, senescepte, povas atingi ilin.

Okaze de la abiturienta ekzameno, la direktoro de mia mezlernejo, adiaŭante la gestudentojn, bondeziris al ĉiuj, ke ili „estu antaŭvidemaj, kiel ŝakisto, kaj precizaj, kiel horloĝisto”. Tre bona konsilo, ĉu ne?

Laŭ sciencistoj, estas multaj bonaj fruktoj de ŝakludado. Ĝi plibonigas la intelektajn kapablojn (imagopovon, koncentriĝon, bonan memoron) kaj aritmetikajn kapablojn, akrigas lingvajn kapablojn, trejnans kritikan pensadon, organizajn kapablojn, planadon de agoj kaj antaŭvidajn konsekvencojn, reziston al distro, reflekson kaj plibonigas motoran kunordigon, disvolvas la emocian inteligentecon, helpas trejni kaŭzo-efikan pensadon. Krom tio tre efike protektas kontraŭ neŭrodegeneraj malsanoj kiel demenco aŭ Alzheimer-malsano kaj havas terapeŭtikan valoron. Do, resume, la ŝakludo estas altvalora.

Laŭ la legendo, la saĝulo, kiu inventis la ŝakludon, postulis de la reĝo, kiu volis aĉeti ĝin, ke li pagu en formo de greno. La reĝo devis meti la grajnoj sur la ŝaktabulon en sinsekvaj kvadratoj, sed tiel ke ĉiu sinsekva kampo havus duoble pli multajn grajnoj ol estas en la antaŭa, komencante kun nur unu grajno sur la unua kvadrato. Por la reĝo, kaj probable por multaj el vi, tio ŝajnis kiel malgranda rekompenco kaj la reĝo ofendiĝis. Ja, li estis riĉa kaj povis donaci al la saĝulon multon, verajn trezorojn kaj ne nur kelkajn grajnoj! Tamen, kiam oni zorge kalkulis la postulitajn grajnoj sur la ŝaktabulo, montriĝis, ke en ĉiuj grenejoj en la tuta reĝlando ne estis

sufiĉe da grajno por pagi la prezon, kiun la saĝulo postulis. La nombron de grajnoj postulitaj priskribas la matematika funkcio de „2” al la potenco de „n” (2^n) ĉar en ĉiu sinsekva kvadrato estus duoble pli multajn grajnoj ol en la antaŭa. La unuaj nombroj estas malgrandaj: 1, 2, 4, 8, 16, 32... alivorte $2^0, 2^1, 2^2, 2^3, 2^4, 2^5...$ tamen la funkcio kreskas rapide. La nombro de grajnoj sur la lasta 64-a kvadrato devus esti 2 ĝis la 63-a potenco, kio estas tiel grandega, ke ni ne kapablas imagi ĝin. Oni devus meti en la lasta kampo 9 223 372 036 854 776 000 grajnoj. Entute 18 446 744 073 709 550 000 grajnoj estus bezonataj por pagi al la saĝulo, tio estas pli ol 18 kvintilionoj, la kvanto de greno rikoltita 8 fojojn de la surfaco de la tuta Tero. La grenejo necesa por stoki ĉi tiun kvanton da greno, devus esti 4 m alta, 10 m larĝa kaj 300.000.000 km longa!



Lastatempe mi renkontis kelkajn ŝakludantojn inter polaj esperantistoj. Mia opinio estus bone organizi ŝakludan turniron, por uzantoj de la lingvo internacia, kiuj „scipovas movigi pecojn sur la ŝaktabulo”. Se iu ŝatus partopreni tian turniron, bonvolu kontakti min aŭ samideanon Aleksander Zdechlik - spertulon pri la ŝaklada arbitrado kaj tiam ni provos organizi la turniron. Poste ni povus aranĝi eĉ la internacian turniron. Intertempe mi proponas ludi, unu kun la alia, pere de: www.lichess.org

La retejo havas priskribojn en diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Ĝi ebligas ne nur ludi sed ankaŭ lerni la ŝakludon. Danke al la „Ŝaklada ABoCo”, kiu haveblas en la retejo, oni povas lerni kiel fari movojn per la ŝakludajn pecojn.

Tiu retejo ebligas ankaŭ lerni fundamentojn de la ŝakludo. Ekzemple kiel batali: kapti (tio estas mortigi) la malamikajn pecojn kaj samtempe protekti siajn pecojn, kiel fari la ŝakon (ataki la reĝon de la kontraŭulo), kiel defendi sian reĝon (eskapi aŭ alimaniere certigi sekurecon), kiel fari la

maton (malvenkigi la kontraŭulan reĝon). En la retejo haveblas lecionoj pri diversaj ŝakludaj situacioj.

Antaŭ ol vi komencos ludi kun aliulo, vi povas spekti ludojn de aliaj ludantoj aŭ provi la ludon kontraŭ komputilo. Tamen, la plej agrable estas ĝui la ŝakludon kun alia homo, prefere renkontiĝante en klubejo, ie en la parko aŭ apud rivero, kio ofte okazas en mia urbo apud la reĝa kastelo.

Pri kio ni aŭdas

UEA Komunikoj

Kampanjo por Tutmonda Arbo-plantado (TAP)

Universala Esperanto -Asocio proponas dekjaran kampanjon „Tutmonda Arbo-plantado”. La agado komenciĝis la 20-an de septembro 2020 kaj finiĝos la 24-an de oktobro 2030 (Tiutage, en la jaro 1945 estis fondita internacia organizaĵo *Unuiĝintaj Nacioj*) La celo la de la kampanjo estas jena: planti 1000 arbojn ĝis 2030j, po 100 arboj ĉiujare. Kiel partopreni? Esperantistoj povas planti arbon en sia loĝregiono, ekzemple okaze de iu evento, aŭ mem organizi plantadon. UEA petas sendi fotojn kaj informojn pri tiu agado al: Fernando Maia Jr. (fmaiajr@gmail.com), aŭ al: Normand Fleury (normandfleury@gmail.com) kaj al la redakcio de la revuo Esperanto (redakcio@revuoesperanto.org), kiu povos prezenti viajn tiutipajn agojn en la Reta Revuo (revuoesperanto.org).

Kiel subteni la kampanjon? Bonvenas donacoj al la Fondaĵo *Klimato* (uea.org/alighoj/donacoj/co2) – tio helpos al UEA subteni arbo-plantadon en la mondo. Ankaŭ aliĝo al UEA bonvenas, ĉar (re)aliĝo de membroj ebligas al la Asocio finance subteni tiun kaj aliajn agadplanojn (uea.org/alighoj/alighilo).

Novplantita dum Mondafest' E-arbo en Kanado



Robert Kamiński

Kastelo en Baranów Sandomierski

En la forko de la riveroj Vistulo kaj Babulówka, prosime al Sandowierz, brilas la plej valora kaj la plej bela iama aristokrata rezidejo - la kastelo en Baranów Sandomierski. Ĉi tiu impona konstruaĵo de la renesanca arkitekturo estas unu el la plej bone konservitaj en Eŭropo.

En mezepoko, sur la loko, kie nun situas la kastelo, estis kavalira defenda kortego, kiu en la 15-a jarcento apartenis al la familio Baranowski de la blazono Grzymała. La restaĵoj de ĉi tiu konstruaĵo konserviĝis ĝis hodiaŭ en la kastelaj keloj.



En 1578 Baranów ekposedis Rafał Leszczyński de la blazono Wieniawa kaj jaron poste lia filo Andrzej, kiu komencis konstrui tie la kastelon. La konstruado finiĝis en 1606 kaj tie trovis sian lokon la fama biblioteko de la familio Leszczyński. La kastelo mem estis la ĉefa rezidejo de Andrzej Leszczyński, kiun plurfoje vizitis tie la reĝo Stefan Batory.

La projekto de la kastelo estis probable prilaborita de Santi Gucci, kion indikas la skulptitaj detaloj kaj la tuta arkitektura formo, tamen la konstruadon, post la morto de Gucci, finis jam liaj studentoj. La kastelo estas konstruita laŭ la rektangula plano, kun kvar cilindraj angulaj turoj kaj la rektangula, enireja pordego. La riĉaj stukskulptaĵoj, atribuitaj al Jan Baptiste Falconi, konservitaj en la volbo de la nordorienta turo, devenas de la periodo de familio Leszczyński, kiu loĝis ĉi tie dum pli ol cent jarojn.

Post 1620, la kastelo estis ĉirkaŭita per bastionaj fortikaĵoj, kiuj evidentiĝis senutilaj dum la milito kontraŭ Svedoj - t.n. sveda inundo. Printempe 1656, svedoj renkontis proksime al Baranów litovajn trupojn gviditaj de Paweł Sapieha kaj retiriĝis al Zawichost.



La lasta posedanto de Baranów el la familio Leszczyński estis Rafał, la patro de la estonta reĝo de Pollando, Stanisław Leszczyński. En 1677, la kastelo fariĝis posedaĵo de Dymitr Wiśniowiecki, kiu regis ĉi tie ĝis 1682 kaj dum ĉi tiu periodo ne enkondukis ŝanĝojn en la konstruaĵo. Poste, la kastelo fariĝis posedaĵo de la princo Józef Karol Lubomirski de la blazono Śreniawa. En 1695, li entreprenis partan rekonstruadon de la rezidejo kaj renovigon de la interno. La laboroj estis komisiitaj al Tylman el Gamenen, unu el la plej elstaraj arkitektoj de la tiutempa Pollando. La kastelaj fasadoj estis modernigitaj kaj okcidente oni konstruis pasejon apud la ekzistanta

apogmuro, en kiu estis aranĝita pentraĵgalerio. Por la galerio estis projektitaj la stukaj ornamaĵoj, konservitaj ĝis hodiaŭ en la t.n. *Galeria Tyłmanowska* kaj en apudaj ĉambroj.

La familio Lubomirski posedis la kastelon ĝis 1720, poste ĝi ĝi laŭvice apartenis al la princo Paweł Sanguszko, Jacek Małachowski, Józef Potocki kaj Jan Krasicki. Danke al tiaj oftaj ŝanĝoj de posedantoj, la kastelo konservis sian originan renesanc-barokan karakteron, donitan al ĝi de Leszczyński kaj Lubomirski familioj. Dum la regado de la familio Krasicki, la kastelo estis denove renovigita. Fine de la 18-a jarcento, ofte restadis tie la episkopo Ignacy Krasicki.

En la 19-a jarcento, la kastelo dufoje bruliĝis. La fajro de la 24-a de septembro 1849 detruis la netakseblajn kastelajn internojn. Lignaj plafonoj, tegmentoj, ĉiuj kastelaj ekipaĵoj kaj, kompreneble, la biblioteko ne travivis. La familio Krasicki ne povis rekonstrui la rezidejon, kaj la sekvaj posedantoj ne zorgis pri la posedaĵo.

La ruinigita kastelo en Baranów estis finfine aŭkciita, kaj, en 1867, aĉetis ĝin Feliks Dolański de Grębów. Ĝis la dua mondmilito la kastelo ne ŝanĝis siajn posedantojn. La dua fajro okazis en 1898. Post ĉi tiu incendio, la familio Dolański provis restarigi la kastelon kaj komisiis laboroj al Tadeusz Stryjeński. En la teretaĝo, ĉe la sudokcidenta turo, estis aranĝita kapelo, ornamita per vitraloj de Józef Mehoffer kaj metita en altaron la pentraĵo de Jacek Malczewski, *Nia Sinjorino de la Senmakula*. La lasta posedanto de la kastelo, antaŭ la dua milito, estis Roman Dolański.

La tempoj de la dua mondmilito kaj la mallonga periodo post ĝi lasis tragikajn spurojn sur la teknika stato de la kastelo. Nek la nazioj, nek la sovetianoj, kiuj detruis ĝian internon bruligante fajrojn el plankoj kaj antikvaj mebloj, zorgis pri ĝi. Post la fino de la dua mondmilito, la tiama popola registaro transdonis la kapelon por sociaj celoj. Estis stokitaj tie cerealoj kaj artefaritaj sterkoj, por la bezonoj de la loka loĝantaro.

Post la militaj detruoj, la kastelo, en 1959-1969, estis rekonstruita kaj restaŭrigita de la ŝtato. La laboron prizorgis prof. Alfred Majewski. Poste la objekto estis transdonita al la Sulfuraj Minejoj kaj Laborentrepreno "Siarkopol" en Tarnobrzeg.

En julio 1997, Agentejo pri Disvolvo de Industrio en Varsovio fariĝis nova posedanto, kiu administras la kastelon ĝis hodiaŭ. Nuntempe, en la kastelo troviĝas hotelo kaj la muzeo, kiu estas vizitebla ĉiutage kun ĉicerono. En la kastelaj salonoj okazas kunvenoj, konferencoj nuptofestoj kaj denove viglas tie kultura kaj turisma vivo.

Fotoj de Andrzej Sochacki.

Roman Dobrzyński

Zamenhofa stafeto

Kun Margaret Zaleski-Zamehof interparolas Roman Dobrzyński

R.D: *Saluton Margaret. Via fratino Hanna Zaruski-Zamenhof sciigis min, ke Vi parolas ses lingvojn. Kiujn?*

M.Z-Z: Mia denaska lingvo estas la pola. En Pollando mi devige, sed kun plezuro, lernis la rusan. Post la translokiĝo al Francio, en la jaro 1973, mi simultane eklernis la francan kaj la anglan, sed la pola estis plu uzata en nia familia rondo kaj kun miaj polaj geamikoj, ekzemple kun la fama esperantistino Barbara Despinay. La germanan mi lernis, dum mi estis edzino de germano. La sesa estas Esperanto. Kaj mi certe klopodos lerni ankoraŭ aliajn lingvojn.

Ĉu Via patro instigis Vin lerni Esperanton?

Mi ne estas denaska esperantistino. La plej grava familia tradicio, kiun mia patro devigis min sekvi, estis studi kaj fariĝi kuracisto, eĉ se ne oftalmologo. Ekde mia pola infaneco mi interesiĝis pri lingvoj, pri literaturo, poezio, sed mi sekvis la konsilon de mia patro kaj mi studis medicinon, flanken metante mian amon al fremdaj lingvoj kaj kulturoj. Lernado de lingvoj estis mia pasio kaj mi facile proprigas ilin al mi. Kiam mi emeritiĝos, lingvo - lernado daŭre estos mia plej grava ŝatokupo.



Verŝajne Vi heredis genojn de la Praavo?

Mi esperas ke jes, ĉar li certe estis eksterordinara kaj bona homo. La similaj estas, inter aliaj, nia fako, nia amo al lingvoj, nia zorgemo pri homoj..

Vi lernis lian lingvon sufiĉe malfrue. Kial vi komencis?

Mia patro ofte sola reprezentadis la Zamenhof-familion dum diversaj esperantistaj eventoj. En la jaro 2015 li fariĝis 90-jara. Pro tiu konsciigo de la tempopaso, li petis, ke mi akompanu lin al la Universala Kongreso de Esperanto en Lille, kaj decidis transdoni al mi kaj mia fratino Hanna, la taskon reprezenti la familion en la mondo de esperantistoj.



Sola filo de Margaret, Pierre-Louis Lebard (Petro Ludoviko Lebard) kun ŝia avo

Kiel Vi lernis Esperanton?

Mi provis memstare eklerni, kaj decidis reprezenti la familion Zamenhof dum la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono, en

2018. Mia lingvokono ne estis ankoraŭ perfekta. Bonŝance, tiun kongreson ĉeestis ankaŭ bonkora feino. Ŝi decidis uzi sian miraklan povon, magian bastoneton, por instrui al mi Esperanton. Tiu feino estas Katalin Kováts, hungarino, mirinda profesoro, talenta virino. Ŝi loĝas en Hago, la ĉefurbo de Nederlando. Katalin proponis helpi min lerni Esperanton. Dum la sekva jaro ni studadis kune preskaŭ ĉiutage. Estis facile, ĉar ni amikiĝis kaj kun entuziasmo kaj plezuro babildis, vizitadis unu la alian, fariĝis nedisigeblaj.

Ĉu Vi konscias la cezuran momenton, kiam Vi eksentis ne plu esti komencanta esperantistino?

Jes! Subite, la 6-an de julio 2019, mi malkovris, ke mi parolas Esperanton. Tiu miraklo okazis en William Peace Universitato en Ralleigh, Usono, dum la jubilea, 50-a, NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro), kien mi vojaĝis kune kun Katalin Kováts Tie mi ekzameniĝis kaj mi trapasis la KER-ekzamenon, je la nivelo C1. Dum tiu kursaro, kiam mi denove fariĝis studentino, mi eksentis min vere parto de la Esperanto-familio. Mi ankaŭ malkovris, kiel mirinde riĉa kaj interesa estas nia kulturo. Mi denove spertis la plezuron lerni, legi, verki. Sezamo de la nova mondo malfermiĝis antaŭ mi, per la mirakla uzo de nia lingvo. Mi konsciis, ke tiu evento, tiu sukceso, pri kiu mi tiom fieras, estas nur komenco, komenco de mia aktiva vivo en Esperantujo. Dum la sekva, la 104-a Universla Kongreso de Esperanto en Lahti, Finnlando, Katalin transdonis al mi, dum la oficiala kongresa malfermo, mian KER-atestilon. Tio estas mia grandvalora ŝlosilo por eniri Esperantujon.

Ĉu ankaŭ Via fratino parolas Esperanton?

Hanna ne parolas Esperanton, tamen ŝi multe interesiĝas pri la lingvo kaj movado, ŝi skribas artikolojn, prelegas, tradukas, kontribuas al la disvastiĝo de la lingvo kaj la ideoj de nia Praavo.

La vivsorto de Via patro spertigis lin per eksterordinara biografio, kiun respegulas lia kvarvorta nomo Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof. Ĉu li parolis kun Vi pri sia pasinteco?

Ne, bedaŭrinde, preskaŭ neniam... Li rakontadis foje kelkajn anekdotojn, pri la lernado de Esperanto kun la helpo de Lidia, pri la dimanĉa aĉetado de poŝtmarkoj kun la patro Adam, pri la tagmanĝoj ĉe la

avino. Li sufiĉe volonte rakontadis pri eventoj, kiuj okazis antaŭ la dua mondmilito. Koncerne la vivon dum la teruraj jaroj de la milito, li konsilis al mi legi la libron “Zamenhof-strato”. Certe vi spertis, ke, kiam mia patro kunlaboris kun vi pri la libro, li nur paŝo post paŝo, konsentis reveni al la memoro.

Bonvolu rakonti pri Via filo, la prapranepo de la kreinto de Esperanto.

Ankaŭ mia filo, Pierre, fariĝis kuracisto, laŭ la longa familia tradicio. Li trejniĝas por fariĝi psikiatro. Li ankoraŭ ne esperantistiĝis, sed tamen partoprenis en la UK en Lille.

Li ankaŭ petis, ke Katalin Kovats kaj mi organizu kelkajn lecionojn por li kaj liaj geamikoj en Parizo. Ni faris tion jam dufoje, kaj esperas baldaŭ daŭrigi. Li ŝategas vojaĝi, malkovri novajn lokojn kaj kulturojn, kaj certe ĝuus la uzadon de nia lingvo. Cetere, mi sekrete konfesas, ke li fieras pri siaj radikoj.

Mi petas, aldonu unu frazon pli.

Mi sentas min bonŝanca pro miaj radikoj, kaj mi esperas partopreni utile en nia bela movado.

Dankon, Margaret.

Linguosciencia angulo

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

De rilate al A-vorto aŭ E-vorto

De-esprimo, kiu rilatas al A-vorto aŭ E-vorto, povas havi diversajn el tiuj signifoj, kiujn de povas havi ĉe verboj, ĉe agaj O-vortoj kaj ĉe ne-agaj O-vortoj:

- *Mia projekto estis tre multe **diferenca de tiu ideo pri plibonigoj, kiun Vi havas.** La projekto diferencas de tiu ideo. De montras apartecon.*
- *Ĉu ankaŭ ĉiuj viroj devas posedi ian perfektecon, por akiri al si staton **liberan de grandaj suferoj kaj mizero.** De montras apartecon.*

- *Bona estas Romo, sed tro **malproksima de nia domo***. De montras apartecon.
 - *Mi, **ebria de feliĉo**, alkroĉiĝis al lia kolo*. De montras kaŭzon.
 - *Niaj okuloj estis **plenaj de larmoj***. De montras kaŭzon kaj enhavon.
 - *Tio estis **prudenta de la flanko de la jura konsilisto***. De montras originon.
 - *La marŝo daŭris sep horojn **ekskluzive de la paŭzoj***. = ...*ekskluzivante la paŭzojn*. La marŝodaŭro ne inkluzivis la paŭzojn. De montras sencan objekton. Oni ankaŭ povus uzi la finaĵon N: ...*ekskluzive la paŭzojn*.
 - *Li scias ĉiujn latinidajn lingvojn **escepte de la rumana***. = ...*se oni esceptas la rumanan*. De montras sencan objekton. Oni ankaŭ povas diri ...*escepte la rumanan*.
 - *Ĉiuj aliaj loĝantoj de la lando staris **ĉirkaŭe de la palaco***. = ...*en la ĉirkaŭo de la palaco*. De montras apartenon, apudecon.
 - *Mi salutas vin **nome de mia frato***. = ...*en la nomo de mia frato*. De montras apartenon, posedon.
- Ĉe participoj *de* tamen havas pli precize limigitajn signifojn.
- Ofte E-vorto + *de* formas esprimon, rolvortaĵon, kiun oni uzas kvazaŭ unu rolvorteton: *dekstre de, escepte de, fare de, fine de, inkluzive de, interne de, ene de, kaze de, kaŭze de, meze de, norde de, sekve de, supre de* k.t.p.

Literaturaĵoj

Proksimiĝas tempo de la Nova Jaro kaj Kristnasko. Ĝi estas tempo de festado kaj tempo de rememoroj. Bona teksto por tio estas konata kristnaska kanto de la ensemblo „Czerwone gitary” („Ruĝaj gitaroj”) "Estas tiu tago" esperantigita de Irena Łowińska, esperantistino el Varsovio, kiu forpasis ĉi-jare.

Redakcio

Estas tiu tago

(Jest taki dzień)

Aŭtoro: *Krzysztof Dzikowski*, Tradukis: *Irena Łowińska*, muziko: *Seweryn Krajewski*

Jen estas tag', la decembra, tamen varma.
Dum tiu tag' repaciĝo regas ĉarma.

En tiu temp' ĝojo nin salutas ĝua;
Ni konas ĝin ekde infanaĝ' plej frua.

La ĉielo al la tero
kaj la tero al Ĉielo,
Arboj, birdoj ĉiuloke
bondeziras ĉiujn reciproke.

Jen estas tag' unusola en la jaro.
Nur de l' krepusk' komenciĝas tiu tago.
Nun, dum vesper' kune restas ni en paco;
Tag' bela plej, de la jaro jen donaco!

La ĉielo al la tero
bondeziras kun espero.
Kiam fine ni ekdormos,
nokt' aromon koniferan portos.



Jest taki dzień

Jest taki dzień, bardzo ciepły, choć grudniowy
Dzień, zwykły dzień,
w którym gasną wszelkie spory
Jest taki dzień, w którym radość wita wszystkich
Dzień, który już każdy z nas zna od kołyski

Niebo ziemi, niebu ziemia
Wszyscy wszystkim ślą życzenia
Drzewa ptakom, ptaki drzewom
Tchnienie wiatru płątkom śniegu

Jest taki dzień, tylko jeden raz do roku
Dzień, zwykły dzień, który liczy się od zmroku
Jest taki dzień, gdy jesteśmy wszyscy razem
Dzień, piękny dzień,
dziś nam rok go składa w darze

Niebo ziemi, niebu ziemia
Wszyscy wszystkim ślą życzenia
A gdy wszyscy usną wreszcie
Noc igliwia zapach niesie.



Ne forgesu reaboni „Polan Esperantiston” por 2021

Saĝulaj pensoj

Paŭlo Sergio Viana, Brazilo

Monda Tago de Afableco



Nuntempe oni fiksas specialajn tagojn por plej diversaj temoj: “Tago de la Libro”, “Tago de la Esperanta libro”, “Tago de Folkloro”, “Tago de Infanoj”, “Tago de Patroj”, “Tago de Patrinoj”, eĉ “Tago de Geavoj”. La listo estas senfina, se ne paroli pri la tagoj dediĉitaj al katolikaj sanktuloj. Kelkaj el tiuj datoj eĉ fariĝas feriaj en multaj landoj, ekzemple la Kristnasko kaj la Tago de Universala Frateco (la 1-an de januaro). La intenco certe estas tute laŭdinda, nome memorigi la homojn pri pozitivaj sociaj sintenoj. Pri la efikeco de tiuj memorigiloj, mi iom dubas, sed la afero sonas tiel simpatie, ke ne eblas kritiki tiun kuriozan kutimon en nia moderna mondo.

La 13-an de novembro estas “Monda Tago de Afableco”, starigita en la jaro 2000, post konferenco en Tokio. Transire de la 20-a al la 21-a jarcento, la homoj ekkonsciis, ke la homaj rilatoj ne estas tute sanaj kaj harmoniaj tra la mondo. Nome, ke ekzistas tro da nenecesaj konfliktoj, rivaleco,

disputemo, kontraŭemo kaj netoleremo inter ni. Mankas konsentemo, kompatemo, respekto, interesiĝo pri malsamaj pensmanieroj.

Aliflanke, afableco estigas afablecon, bonvolemo bonvolemon. Ju pli mi klopodas kompreni mian najbaron, des pli kreskas la ŝanco, ke ankaŭ li komprenu min. Ne temas pri ŝablona sentimentaleco aŭ bigota religiemo, sed pri realisma strategio por pli sana kunvivado. Oni rajtas dubi pri tiaj ideoj, sed ĉiuj konsentas, ke afablaj gestoj nenion malbonan povas alporti al iu ajn.

Je la “Tago de Afableco”, multaj revuoj kaj ĵurnaloj publikigas listojn da proponoj pri afablaj agoj, en la ĉiutaga vivo. Certe ne por unu sola tago en la jaro, sed por ĉiuj tagoj, en ĉies vivo:

- Salutu nekonaton surstrate.
- Donu vian lokon al alia homo en la vico, ekzemple en bankoficejo.
- Lasu pagitan kafon por nekonato, en la kafejo.
- Ordigu la skribotablon de via kolego, antaŭ lia alveno en la laborejo.
- Kolektu rubaĵon surstrate, kiam vi piediras.
- Proponu helpon al maljunulo.
- Petu pardonon (vi ja scias, de kiu).
- Skribu sur karto pozitivajn vortojn kaj alfiksu ĝin al la mesaĝtabulo

en via laborejo.

- Prenu floreton en la ĝardeno kaj donacu ĝin al amiko.
- Laŭdu iun personon pro bone farita laboro.

Ŝajnas al mi, ke “Tago de Afableco” bone kongruas kun la Esperantista maniero kompreni la mondon.

Leterkesto



Jerzy Dryja, Esperanto sur la klostra retpaĝo

Sur la retpaĝo *ofm-przemysl.pl* de la Klostro kaj Paroĥejo de Franciskanoj – OFM (Reformantoj) en Przemyśl, ekde la jaro 2013 estas legebla la esperantlingva bulteno por la spirita formado “Frateco”. La bultenon redaktas ano de la ĉi-klostra komunumo, la sindonema pastro Stanisław Płachta OFM, kiu ĉi-jare festas siajn du gravajn jubileojn – 80-jarojn de sia vivo kaj 50 jarojn de la pastra servado. Ni bondeziru al la pastro multan sanon kaj pliajn verkemajn fortojn.

Aldonindas, ke la pastro S. Płachta estas aŭtoro de la “Liturgia vortaro pola-esperanta kaj esperanta-pola”, eldonita en 2011.



Magdalena Tatara, ILEI alvokas

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - POLA SEKCIO invitas ĉiujn, kiuj interesigas pri instruado de Esperanto kaj pri progresado en la lingvo, membriĝi al ILEI.

Membrokotizoj kaj abonoj 2021:

60 zl – membrokotizo de ILEI kun papera *Internacia Pedagogia Revuo*

30 zl – membrokotizo de ILEI kun reta alirol al *IPR*, *IPR* estas inkluzivita en la membroco.

65 zl - abono de *Juna Amiko* (papera)

35 zl - abono de *Juna Amiko* (reta)

105 zl (anstataŭ 125 zl) = **SUPERA MEMBRO** de ILEI kun plena alirol al www.edukado.net (demandu pri tio sekciestron; papera *IPR* kaj papera *JA* ricevota en la sama koverto)



LIMDATO PO MEMBRIĜI: LA 31-a DE DECEMBRO 2020

Eblas pagi la membrokotizojn kaj abonojn al la konto de Pola Sekcio de ILEI n-o 42 2130 0004 2001 0558 6110 0009 – VolkswagenBank. Posedando de la konto estas Pola Esperanto-Asocio.

Korespondadreso de ILEI-PL: ul. Grzegórzecka 74/4, 31-559 Kraków, Retadreso: mtatara@gmail.com, Plie pri ILEI legu ĉi tie: <https://www.ilei.info/>



<https://masko.ikso.net/>, Esperanto-buŝmaskoj

Buŝmasko iĝis certe la simbolo de la jaro 2020 – ĉu ni ŝatas tion aŭ ne. La protekta buŝmasko antaŭ jaro por multaj neimagebla, nun deviga tutmonde. Estas klare, ke indas protekti kaj sin mem kaj la aliulojn – do jen, kial ne fari tion kaj samtempe dume varbi por Esperanto? 😊

Tial E@I proponas por vi ĉiuj unikajn Esperanto-buŝmaskojn! Haveblas 5 malsamaj, sed tre allogaj aspektoj, ĉiu kun la ĉefa mesaĝo: “Esperanto”. Elektu la ĝustan, la plej taŭgan por vi kaj mendu sur ĉi tiu retpaĝo. Ne forgesu: la masko estas ĉi-jare tre taŭga donaco – ĉu al viaj amikoj, familianoj, membroj de via Esperanto-asocio aŭ klubo. Granda avantaĝo ankaŭ estas, ke eblas mendi plurajn (eĉ multajn) maskojn, kaj ne pagi altajn

sendokostojn – maskoj estas malpezaj, do eniras multaj al malpeza pakaĵo. Do jen, eble al kutima kristnaska poŝtkarto ĉi-jare aldonu al Esperanto-amikoj Esperanto-buŝmaskon! 😊

Niaj maskoj estas dutavolaj, mane produktitaj (kudritaj) en Slovakio, de surloka produktanto en la urbeto Partizánske, kie ni (E@I) situas. Grafikaĵojn por ili pretigis itala Esperantisto (la kreinto ankaŭ de retevent.com) Edoardo Nannotti.

Prezo: Unu masko kosta 6€.

Sendokostoj:

| Landoj | 1-2 ekzempleroj | 3-6 ekzempleroj | 7-25 ekzempleroj |
|-------------|-----------------|-----------------|------------------|
| Eŭropa Unio | 1,60 € | 2 € | 7,50 € |

Pakaĵoj por 1–6 buŝmaskoj estas sendataj per neregistrita poŝto (kiel letero). Se vi preferas, ke ni sendu per registrita letero, bonvolu alkalkuli 3 EUR al poŝtkostoj.

Pakaĵoj kun 7–25 buŝmaskoj estas sendataj per registrita letero.



**Ne forgesu reaboni
„Polan Esperantiston” por 2021**



Polyglot Gathering (Plurlingvula kunveno)

Dum la tagoj 19-23 de majo 2021 en Teresin apud Varsovio okazos internacia kvintaga evento kun prelegoj, laborsesioj kaj sociumado por plurlingvuloj.

Polyglot Gathering (“Plurlingvula kunveno”) estas ĉiujara renkontiĝo organizata por plurlingvuloj kaj lingvoŝatantoj.

Ĉi tiu evento kutime venigas pli ol 500 partoprenantojn. Dum la tago okazas prelegoj pri diversaj temoj (metodoj de lingvolernado, prezentoj de unuopaj lingvoj, ktp.), vespere okazas lingvorilata distra programo, kiel ludoj, lingvaj kvizoj aŭ multlingvaj koncertoj. La ĉefa komuniklingvo estas la angla, sed ĝi ne estas deviga kaj prelegoj okazas ankaŭ en aliaj lingvoj (ekzemple la germana, franca, hispana, itala, rusa aŭ en Esperanto).

Ĉi tiu evento estas organizita de esperantistoj kaj kutime ĝis 1/4 de la partoprenantoj (ek)lernis aŭ regas Esperanton.

Pluraj informoj: www.polyglotgathering.com/, <https://eventaservo.org/e/pg2021>



Teresa Pomorska, La 50-a jubileo de pastreco de Stanisław Płachta

Dum lastaj monatoj Pastro Stanisław Płachta (OFM) celebras du gravajn datrevenojn. Oktobre li festis 80 jarojn de sia vivo kaj la 19-an de decembro li festas 50 jarojn de la pastreca servado. Multajn jarojn de sia vivo li dediĉis al esperantista katolika movado, celebrante esperantlingvajn sanktajn mesojn dum kongresoj, spiritaj ekzercoj kaj E-aranĝoj (ĉefe en Krakovo). Ekde 1991 jaro li redaktas bultenon “Frateco” (ĝis nun aperis 131 numeroj). Dank al riĉa enhavo kaj belstila lingvaro la eldonaĵo grave kontribuas al spirita formado kaj lingva pliboniĝo de esperantistoj. Unu el oraj pensoj, per kiuj



nutras nin Pastro Stanislavo estas ĉiam aktuala, precipe en nuna tempo: “En silento serĉu Dion, en doloro preĝu al Li, en peno fidu al Dio, en ĉiu tempo danku al Li”

Ni petas, ke nia Kara Jubileulo akceptu niajn dankojn kaj sincerajn, elkorajn bondezirojn:

“Dian benon kaj bezonatajn gracojn por pluaj longaj jaroj de Via servo al Dio kaj al homoj. La Sankta Spirito malavare superŝutu Vin per siaj donacoj, por ke Vi plenumu la pastrecan servon kun amo al Kristo kaj al ĉiuj, kiujn Dio starigas sur Via vojo. La Patrino de Pastroj estu ĉiam ĉe Vi”.

E-Kalendaro

Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2020-2021

Forstrekitaj aranĝoj estis planataj, sed pro la pandemio ne povis okazi aŭ okazos alitempe

| | | |
|-----------------------|---|--|
| 11.2020 | Esperantista renkontiĝo-GRUPE – 24 en Gliwice | PEA, filio en Gliwice, stanislav.mandrak@gmail.com |
| 5-6. 12.2020 | 5-a Esperanta konkurso “Vortbeleco en Esperanto” en Wrocław | Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka |
| 11-13. 12. 2020 | Virtualaj 21-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko | Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl |
| 1-3.1. 2021 | 12-a JES Junulara Esperanta Semajno okazos virtuale kaj samtempe en multaj lokoj. | Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl |
| 25.7.2021 1.8.2021 | 4-a SAT-kongreso en Bjalistoko Sennacieca Asocio Tutmonda | Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl |
| 23.7.2021 1.8.2021 | Esperanto dum PollandRok – festivalo en Kostrzyn | andim@gmx.li, „Andi Aldi“, ankaŭ por mesaĝeto (SMS): +49-1577-4273240, http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php |

Universalaj Kongresoj de UEA

| | | |
|-------------------|--|--|
| 1-8.08. 2020. | <u>La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 okazis nur virtuala kongreso (VK); la montreala evento okazos en tradicia formo en 2022</u> | Universala Esperanto-Asocio uea.org |
| 17-24.07. 2021 | La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando) okazos en 2021 | Universala Esperanto-Asocio uea.org |

Diverse, facile, bonguste

Edeltraut Hennig, Germanio

Stufitaj kukumoj

- 1 kg da kukumoj
- 1 granda cepo
- 100 g da fumaĵita lardo (aŭ malpli)
- 2 supokuleroj da sunflora oleo
- 100 ml da buljono
- 1 supokulero da vinagro
- iomete da salo, pipro, sukero
- 150 g da acida kremo
- 1 supokulero da saŭsa densigo

Tranĉpecigu cepon kaj fumaĵitan lardon, metu ĉion en poton, stufu ĉion iomete en la sunflora oleo. Tranĉu la kukumojn en maldikajn diskojn.

Metu la tranĉitajn kukumojn en la poton kun cepoj kaj lardo, almetu salon, pipron kaj buljonon. Kiam la kukumoj estos sufiĉe molaj, prifajnu ĉion per vinagro kaj sukero.

Se vi ŝatas, aldonu iomete da kremo.

Manĝu la stufitajn kukumojn kun terpomoj kaj, laŭvole, kun stufita viandotranĉaĵo, fritkolbaso aŭ kotleto.

Bonan apetiton!!



Oni eldonis

En novembro, oni eldonis sub la patroneco de Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko la 105-an numeron de trimonata revuo „Karta”. Ĝi estas plejparte dediĉita al la temo "Lingvo kontraŭ malamo. Esperanto 1887-2020”.

La ĉeftemo de "Karta" 105/2020 estas eksterordinara atingo de Ludoviko Zamenhof: la lingvo Esperanto - rakonto pri la naskiĝo kaj disvolviĝo de la plej populara artefarita lingvo, pri la instigo de ĝia kreinto kaj pri la rolo, kiun Esperanto ludis en diversaj periodoj ĝis hodiaŭ. La artikolo prezentas ankaŭ tekstojn de polaj kaj eksterlandaj entuziasmoj kaj kritikistoj de la universala lingvo, inkluzive deklarojn de Julian Tuwim kaj Leszek Kołakowski.

Eblas aĉeti la revuon sur retejo de la eldonejo „Karta”:
<https://ksiegarnia.karta.org.pl/produkt/karta-105-2020/>



„Dictionary vortaro-słownik“ Tri voluma vortaro Esperanto - Angla - Pola, Angla - Esperanta, Pola - Esperanta.


La aŭtoro: Edward Kozyra

ISBN 978-83-940094-0-3

Eldonita en Malbork en 2020

La vortaro, kaj ampleksa gramatiko de Esperanto (priskribita trilingve), havas sume 2051 paĝojn. La verkon kompilis kaj redaktis Edward Kozyra. Tiu ĉi sekva eldono estas denove prilaborita kaj multe pli ampleksa. Preskaŭ 34% de la terminoj estas tute novaj, ne troveblas ilin en la Esp.-Pola vortaro de T. J. Michalski, ankaŭ en la vortaro *English Esperanto English Dictionary* de John C. Wells eldonita en 2010 kaj en PIV 2005.

Personoj kiuj volas aĉeti la vortaron bonvolu kontaktiĝi retroŝte kun la aŭtoro: kozyraeduardo@gmail.com, esperanto@powiat.malbork.pl



La 30-an de novembro 2020, en Łódź, post longa malsano, forpasis nia samideano, **Tadeusz Barański**. La entombiga ceremonio okazis la 8-an de decembro 2020 je la 10:30 sur la tombejo ĉe la str. Kurczaki 81/85 en Łódź.
Kun la granda malĝojo, Estraro de PEA-filio en Łódź

El fotogalerio de Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki

“PETRO” en Krościenko.

Dum la tagoj 1-5 de majo 1991 en la montara urbeto Krościenko, okazis „Printempa Esperanta Turisma Renkontiĝo - PETRO”.

La aranĝon organizis junulara sekcio de Pola Esperanto-Asocio en Łódź. En la renkontiĝo parto-prenis ankaŭ E-klubanoj el Staszów, esperantistoj el Belgio kaj Italio. Ĉiuj loĝis kaj amuziĝis en bela ripozdomo "Hanka".



Krościenko 1991, Foto: A. Sochacki



Krościenko 1991, Foto: A. Sochacki



Krościenko 1991, Foto: A. Sochacki



Krościenko 1991, Foto: A. Sochacki




Amuze

Adam Wilkus

Krucenigmo pri insektoj

1. Insekto, kiun karakterizas jenaj trajtoj: du paroj da flugiloj, pikilo (nur ĉe inoj), nur kelkaj haroj aŭ neniuj. Ĝi estas rabobesto aŭ parazito de aliaj insektoj (kio estas grava en biologia agri-kulturo, ĉar ĝi eliminis la agrajn damaĝ-bestojn). Ĝi konstruas nestojn en la tero, kutime uzante nestkavernojn de malgrandaj mamuloj. La reĝino demetas ovojn en ĝi, kaj la eloviĝantaj laboristoj vastigas la neston kaj nutras la larvojn. Plenkreskaj insektoj manĝas floran nektaron, dolĉajn sukojn kaj sukajn fruktojn.



2. Duonglobforma skarabo kun granda nombro de rondaj makuloj sur la elitroj. Unu el la plej popularaj specioj de tiu insekto, popolnome konata kiel „dia-bovineto”, havas ruĝajn elitrojn kun sep nigraj punktoj. Ĝi estas sankta insekto en la slava mitologio.

3. Fortika kaj vigla ĉasisto, kun elstara vidkapablo, kiu konstruas ĉasajn retojn, rondajn, unu-ebenajn, sufiĉe malalte super la tero. Ĝi vivas ĉefe soleca kaj ĉasas sole. Ekzistas diversaj specioj, kiuj ĉasas insektojn, birdojn aŭ eĉ fiŝojn; en nia lando la plej populara predo por ili estas muŝoj.

4. Malgranda parazito, kiu suĉas sukron de plantoj. Ĝin bredas formikoj por manĝi ĝian mielrosan.

5. Fluganta insekto, konata pro sia rolo en polenado de floroj kaj produktado de mielo. La pozicio de la suno, rilate al la rekta kuro de la insekto, provizas al ĝi la necesan orientiĝon, danke al kio la insekto povas reveni el herbejo al sia ujo, kie vivas la tuta kolonio. Ĝi vidas la utraviolan kaj transruĝan lumon de la suno, ankaŭ dum la nuboplenaj tagoj. Svingodanco de la insekto, kiu moviĝante laŭ la formo de la cifero 8 elsendas aŭdeblan zumadon per vibrigado de la flugiloj, ebligas komunikadon inter anoj de la kolonio.

6. Saltanta insekto kun longaj antenoj (pli longaj ol duono de korpolongo), muzikanta per kunfrotado de la elitroj. Foje infestadoj de tiuj insektoj kaŭzas kolosajn ekonomiajn perdojn kaj eĉ malsategon en landoj, kie ili voris la tutan rikolton.

7. La verdkolora, raba insekto, kun triangloforma kapo, kiu estas kanibalo. Ino, post seksumado, foje formanĝas la masklon, se manĝo malabundas en la ĉirkaŭaĵo. Laŭ sciencistoj pri biologio, ĝi faras tion por ŝpari energion, necesan por ovometado. Atendante ĉasaĵon, ĝi sidas kun la antaŭaj kruroj levitaj, tiel ke ili similas preĝanton, kio donis nomon al unu ĝia specio.

8. La raba insekto, kies korpo konsistas el kapo, longa torako kaj postaĵeto. Ĝia kapo havas du grandajn okulojn, du malgrandajn antenojn kaj mordan buŝan aparaton. La okuloj konsistas el multaj unupartaj okuletoj. La torako de la insekto konsistas el tri segmentoj. El ĉiu segmento elkreskas unu paro de gamboj. Tiu insekto havas du parojn de flugiloj, kiuj elkreskas el la dua kaj tria torakaj segmentoj. La insekto flugas tre bone, kapablas ne nur halti en aero en unu loko, ekzemple ĉe herbejo aŭ super lageto, sed ĝi kapablas ankaŭ flugi dorsdirekten. Ĉiu flugilo de la insekto povas funkcii aŭtonome, sendepende de la alia.



9. La insekto, kiu kutime havas belegajnflugilojn. Ĝi disvolviĝas el raŭpo. Multaj specioj de tiu besto estas aktivaj dumtage kaj kelkaj aliaj nokte, antaŭ ĉio dum krepusko. Oni povas ofte vidi la belan insekton en herbejo flugantan el unu floro al la alia.

10. La insekto, kiu havas du skvamajnflugilojn, maldikan abdomenon, kaj longajn krurojn. Buŝo de inoj formas longan pipon, por penetri la haŭton de mamuloj kaj suĉi sangon, kiun ili devas trinki por havigi proteinojn, necesa por evoluigi ovojn, ĉar ĝi mankas en ilia kutima dieto, konsistanta plejparte el nektaro kaj fruktosuko.



Karaj Geamikoj!


Ni bondeziras al ĉiuj tre feliĉan, ĝojplenan kaj ĝuoplenan Kristnaskon kun tre bongustaj tradiciaj Vigiliaj manĝaĵoj. Oni vaste kredas ke ĉiuj bondeziroj ricevataj en tiu ĉi tempo plenumiĝas. Mi do esperas ke ĉiuj kiuj tiun ĉi mesaĝon legas renkontiĝos de nun nur kun plezuroj kaj bonfarto. :-)

Redakcio de "Pola Esperantisto"

12.12.2020 - 90-a datreveno de Internacia Esperanto Instituto



Paroli la saman lingvon ne signifas plene interkonsentiĝi. Sed paroli la saman lingvon helpas ekkoni kaj kompreni la diferencojn, helpas sin reciproke kompreni.



1. Egala



2. Justa

1. Egaleco – doni al ĉiuj la samon.
2. Justeco – doni al ĉiuj la samajn rajtojn.



Ne forgesu aŭskulti esperantajn radiojn. Aŭskutu precipe dum pandemio kaj hejma izolado kiam vi havas pli da tempo.

Redakcia teamo [Elsendoj](#) [Novajoj](#) [Sciencaj informoj](#) [Kulturkroniko](#) [Feliĉesoj](#) [Antaŭ la mikrofono](#) [Fotogalerio](#) [Kontroli la fargosojn](#)

POLA RETRADIO

nia komuna lingvomedio

<http://pola-retradio.org/>



Varsovia Vento Elsendoj

[Aboni fluon](#)

[Aktuale](#) [Anoncoj](#) [Informo](#) [Arkivejo](#) [La redakcio](#) [Gastlibro](#) [Ligiloj](#)

<https://www.podkasto.net/hejmo/>

Pola Esperantisto 6/2020

Helpu preventi la disvastigon de spiraj malsanoj kiel COVID-19

Evitu proksiman kontakton kun malsanaj homoj.



Kiam vi tusas aŭ ternas, kovru la buŝon per papertuko, kaj tuj forjetu ĝin en rubujon.



Evitu tuŝi la okulojn, nazon kaj buŝon.



Purigu kaj desinfektu objektojn kaj surfacojn, kiujn oni ofte tusas.



Ofte lavu la manojn per sapo kaj akvo dum almenaŭ 20 sekundoj.



Restu hejme kiam vi malsanas. Kontaktu kuraciston aŭ sististemon per telefono.



Se vi havas simptomojn de gripo, uzu maskon por eviti infekton de aliaj homoj.



Evitu homamasojn kaj neurgajn vojaĝojn.






Buŝmaskoj el Slovakio
Nova murpentraĵo en Bjalistoko



NIA FOTOGALERIO



Partoprenantoj de 8-a „Esperanto sur strando 2020” en Sopot



Partoprenantoj de 21-aj Virtualaj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj 2020

CU VI ABONIS POLAN
ESPERANTISTON POR 2021?